# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 1 Januaro, 2015




*Estimata Leganto, jen vi legas la unuan numeron (2015) de via ŝatata (ni supozas) eldonaĵo! Feliĉan kaj sukcesan jaron! Ene vi trovos: informon pri la Zamenhofa festo de la Ŝikaga esperantistaro, pri la rekorda kvanto de UEA-ŝatantoj en Vizaĝlibro (FB), pri pro-Esperanta artikolo (ne ofta afero), aperinta en la solida eldono "The Wall Street Journal".*

*Ĉu vi jam aŭdis, ke Montrealo estas kandidato por gastigi la UK-on en 2017? Se ne, legu plue.*

*Sanon kaj amon en la 2015!*

–La Redakcio

## Zamenhofa Tago 2014



Antaŭ unu monato, pli ĝuste – la 14an de Decembro, okazis unu el du tradiciaj eventoj de la E-societo de Ŝikago – ni kune festis la Zamenhofan Tagon kaj Tagon de la E-libro. Jam kvinan (!) fojon salonon disponigis al ni senpage kompanio el la plej potencaj en Ŝikago – Village Green. Ĉi foje ni, "amika rondo" el 14 gesamideanoj, el tri ŝtatoj (Ilinojso, Indiano, Viskonsino) kolektiĝis en belega salono sur la 24-etaĝo de MDA City Apt., kie nia estimata s-ro prezidanto d-ro Leszek Kordylewski, kune kun sia edzino Anna, regalis nin per bongustaĵoj de la poldevena kuir-arto, Kola-Kolo, litova ŝaŭm-vino, kalifornia ruĝ-vino.

La partoprenintoj ĝuis ne nur gastronomian programeron, sed ankaŭ kulturan. En 2009, okaze de la 200-a datreveno de la renoma usona verkisto kaj poeto Edgar Allan Poe nia societo eldonis dulingve (usone kaj E-e) lian faman poemon La Korvo (The Raven). Dum la prezentado de la libro, kiu koincidis kun la Zamenhofa festo'2009, fragmentoj de la poemo estis laŭtlegitaj en naŭ (!) lingvoj. Kaj jen, post 5 jaroj de tiu evento, ni denove aranĝis "lingvan festivalon", dum kiu konata poemo "If…" (*esp*. "**Se…**", vidu sube E-tradukon de V. Melnikov) de la brita verkisto Rudyard Kipling (1865-1936), gajninto de la Nobelpremio en literaturo (1907), estis prezentita multlingve (sur la foto: poemon deklamas hispane Humberto Perez). Partoprenintoj forlasis la salonon kaj feliĉaj kaj – malgajaj, ĉar finiĝis ankoraŭ unu sukcesa E-evento!

## Se…

*de Rudyard Kipling*

**Se** vi konservas kapon en lucido,
dum la popolon regas jam panik',
**se** vi ne donas kaŭzon por malfido,
eĉ kiam ne plu kredas vin amik';
**Se**, malgraŭ laco, povas vi atendi,
rezisti al mensogo kaj malam',
ne cedi al despero, ne pretendi
je plaĉaspekto kaj saĝula fam';

**Se** vin obeas revoj – sed ne male,
**se** regas vi la pensojn en konsci',
**se** al Triumfo kaj Fiask' egale
rilatas vi sen troa emoci';
**Se** vian vorton oni hipokrite
transformas je kaptilo por stultul',
sed post frakas' de viaj faroj, spite,
obstine rekomencas vi de nul';

**Se** povas meti vi sur unu karton
la tutan havon, riske je bankrot',
kaj ĉion perdi, kaj reprovi starton,
sen diri vorton pri perdita lot';
**Se** via kor' kaj nervoj, malgraŭ trivo,
plu servas eĉ en stato de ruin',
kiam nenio restas por la vivo,
krom **Volo**, kiu diras: "**Tenu vin!**";

**Se**, parolante, vi kondutas inde,
kun Reĝoj ne forgesas pri popol',
kaj **se** vin oni fidas, sed ne blinde,
kaj ĉiuj sekvas vin – laŭ propra vol';
**Se** ĉiu hor' de via vivo plenas
per la impeta kuro sen humil',
al vi la tuta Tero apartenas,
kaj pli – vi estas **Homo**, mia fil'.

# Ĉu UK-2017 Okazos en Najbara Montrealo?





Ege grava novaĵo atingis nin de najbara kanada provinco Kebekio: lokaj gesamideanoj ekis inform-kompanion celitan organizi UK-on de E-o en (!) Montrealo… La ideo cirkulas dum kelkaj jaroj, ĝin naskis la prezidanto de Esperanto-USA Orlando Raola: li de jaroj, skribas La Riverego, revis inviti UK-on al Norda Ameriko (originale al Usono, tamen viza politico en Usono estas malfacila). Orlando do turnis sin al Montrealo, urbo kun aktiva E-istaro kja ne nur: en 2017 oni festos 150an datrevenon de Kanado kaj 375-an de Montrealo mem. Devizo: “Tri organizoj – unu teamo!” La kongreson kunorganizos E-Societo Kebekia, Kanada E-Asocio kaj Esperanto-USA.

Jam okazis tre agrabla kaj fruktodona vizito de Clay Magalhães (Konstanta Kongresa Sekretario de UEA) kaj Martin Schaffer (Ĝenerala Sekretario de UEA) al Montrealo por esplori pri la eblo okazigi UK-on ĉi tie en 2017. Ankaŭ Orlando Raola alvenis de Kalifornio por klare montri la subtenon de usonaj esperantistoj por nia komuna projekto. Ili renkontiĝis kun Tourisme Montréal (la urba instanco pri turismo kaj eventoj), vizitis eblajn kongresejojn kaj hotelojn kaj konatiĝis kun la diversaj turismaj vidindaĵoj de la urbo (eĉ spite al la ĉiea neĝo – la unua neĝoŝtormo de la sezono bonvenigis ilin). Kompreneble ili havis diversajn okazojn sperti la montrealan gastamon – kun kulmino en la sabata Zamenhofa Festo, kiu kunigis 38 samideanojn en la Montreala Esperanto-Domo (nekredebla kvanto, aparte por tiu negranda domo!), al kiuj aldoniĝis ankoraŭ pliaj esperantistoj el kluboj tra la tuta Kanado pervidee. Dum la festo Joel legis subtenleterojn de la urbestro de Montrealo, Denis Coderre, kaj de federacia parlamentano kiu reprezentas la distrikton kie situas la Montreala Esperanto-Domo, Alexandre Boulerice. Ni kunmetis etan bildvideeton kiel memoraĵon pri la evento: http://youtu.be/j27dQBc5xM4. *–Ĵenja Amis*

P.S. La estraro de la E-societo de Ŝikago komence de ĉi jaro jam sendis subtenan leteron al Kebekiaj gesamideanoj kun sincera preto je helpo. Ni montru al la mondo, kion nordamerikaj E-istoj povas fari komune!

# Pli ol 5000 ŝatas UEA en Facebook




La nombro de ŝatantoj de la paĝo de UEA en la socia retejo “Vizaĝlibro” (Facebook) superis 5000 la 12-an de Decembro. La paĝo estis kreita la 5-an de novembro 2009. Kun 762 ŝatantoj Brazilo daŭre estas sur la unua loko, kun granda distanco disde Usono (433). Rimarkindan salton en la statistiko faris Litovio, kiu en duona jaro preterpasis Germanion kaj Rusion. Cetere la ordo de la landoj restas sama jam de longe. En la statistiko de urboj Rio-de-Ĵanejro tenas la unuan lokon kun 102 ŝatantoj, dum Vilno superis kun 92 ŝatantoj San-Paŭlon (78), kiu longe certigis ankaŭ la duan lokon por Brazilo.

La seksa distribuo restas sama ekde la komenco: 71% de la ŝatantoj estas viroj kaj 28% virinoj. La UEA-komunumo en Facebook estas tre juneca. Unu el ses ŝatantoj (17,5%) aĝas malpli ol 25 jarojn; ĉe la individuaj membroj de la Asocio nur unu el dudek (5,2%). Kvarono (24%) aĝas 25-34 jarojn (6,2%). Estas tamen klare, ke la UEA-komunumo en Facebook estas mezume multe pli juna ol la kotizanta membraro. *–UEA*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.**
**1350 N. Wells St., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

**27an de Januaro, 2015** – Humberto Perez: “Via sano – per Energia Terapio”. La Adreso: Cobbler Square Loft Apts., 1350 N. Wells St., Chicago

**24an de Februaro** – Les Kordylewski “Ĉu lingva ĥaoso minacas al Usono?” La Adreso: Cobbler Square Loft Apts., 1350 N. Wells St., Chicago

# Pri E-o – en Usona Gazetaro:

*Fine de la 2014-a jaro en serioza (ne flava) usona gazeto* The Wall Street Journal *aperis favora al Esperanto artikolo “One of the Perks of Speaking Esperanto? Free Lodging Around the World”, kiun aŭtoris iu Charlie Wells. Nun je via atento estas proponataj kelkaj unuaj alineoj de la artikolo en originala (pardon) lingvo:*

The key to a free night’s stay in Jim Medrano’s New York City apartment isn’t a stellar rating on Airbnb or a lot of frequent traveler points. It is really just knowing the right words to say in Esperanto.

Through a service called “Pasporta Servo,” speakers of this artificial language invented over a century ago have access to a directory of hosts from all corners of the globe, willing to open their houses free to promote a tongue with no home of its own.

Produced by an Esperanto youth organization in the Netherlands, Pasporta Servo was first printed in 1974, listing 39 hosts. The latest book, published in 2011, is filled with 1,087. An updated edition and website are expected by early 2015.